در هفته دوم ژانیک و Bert رفتند و کلود و همسرش آمدند و او نیز ۱۵ سال است که اسپرانتو را فرا گرفته و ادامه داده است. شارژ سیم‌کارت‌م تمام شده و با تبلت هم نمی‌شود با همه تماس گرفت، اما من ۲ کیلومتر پیاده رفتم و سیم کارت دیگری خریدم و برگشتم، کف پایم از گرما زخم شده است. تمام هفته

بعد از ظهرها برنامه داریم. سخنرانی نینا در مورد روسیه و سخنرانی من که بیش تر شامل نشان‌دادن عکس‌ها بود و تعجب آن‌ها که فکر نمی‌کردند ما (اسپرانتودانان) در ایران جمعیت گسترده‌ای باشیم. عکس‌های گل‌گشت‌های ایران و هم‌چنین برنامه‌های اسپرانتویی در یلدا و نوروز آواز گیتار - تاتر - برایشان تعجب‌آور

بود. یک روز هم خانمی فرانسوی که در طول ۵ سال از برزیل و آمازون دیدن کرده بود عکس‌های سفرش را نشان داد، خیلی جالب بود. در این مدت وی و همسرش به بچه‌هایشان درس می‌دادند و توسط یک اسپرانتیست برایشان پول فرستاده می‌شد. من نیز فردا به پاریس خواهم رفت البته با کمک امانوئل که با من همسفر است، سفر اسپرانتویی من به پایان می‌رسد.

## نکات جالب و برگزیده

همانطور که گفتیم ورود سگ و سیگار به قصر ممنوع بود. صدای قورباغه و غوک‌ها در طول شب بسیار شنیدنی و اطاق من پر از حشرات مثل سنجاقک، ملخ و پروانه بود. یک لانه پرنده هم گوشه ایوان اطاقم ساخته شده بود که من آنرا به فال نیک گرفتم.

در کتابخانه کتابی را به نام گریزیون دیدم که نشان دهنده عظمت و استقبال افراد زیادی بوده است و حالا فقط ۱۵ تا ۲۰ نفر هستند.

هر ساله یک عکس دسته جمعی برای یادگاری بنابر یک رسم و عادت قدیمی در جلوی پلکان قصر گرفته می‌شود.

برای سفرها و سرودهای اسپرانتویی کتاب‌های متعددی دارند که لعانزه تمام آن سرودها را حفظ بود. وقتی عکس‌ها را نشان می‌دادم به

عکس‌های نوروز که رسید از من پرسید این سبزه را می‌خورید؟ گفتیم نه! و یکی به دادم رسید و گفت برای برکت؟ و من گفتم بله.

با توجه به قرار گرفتن کلاس‌ها در محوطه باز، ناگهان دو سگ در کلاس به جان هم افتادند. بی‌نظمی خنده‌داری به وجود آمد که البته سایرین می‌خندیدند و من می‌ترسیدم.

در طول این مدت در سرزمینی که این همه عطر تولید می‌کند من از کسی بوی عطر نشنیدم، زیاد تمیز نیستند.

هر بار در یک برگ کپی تمام آدرس‌های الکترونیکی و شماره تلفن اسپرانیست‌ها تایپ شده و بین همه گروه تقسیم می‌شود. من در طی دو هفته در گریزیون ۱۷۰۰ تا عکس گرفتم که مقداری از روی آلبوم و مقداری از روی کتاب گریزیون است. نظم آن‌ها در رعایت ساعت و



گردهمایی‌ها قابل تقدیر بود. در هر وعده غذایی سبزی و میوه تازه وجود داشت. از در آوردن داخل نان بسیار بدشان می‌آید و ته بشقاب‌شان را با نان پاک می‌کردند. قهوه و دسر بعد از غذا فراموش نمی‌شود.

بنیان‌گذار و سازنده قصر گریزیون هنری میکارد است. اولین عکس در پله‌های قصر متعلق به سال ۱۹۵۲ است. در کتاب گریزیون آمده است که:

قصر ۱۲۵ سال قبل در ۱۸۰۰۰هکتار زمین احداث گردیده است. طبقه پائین و همکف و هم

سطح باغ و شامل: کتابخانه‌ای بزرگ، یک سالن گردهمایی با صندلی‌های حصیری، سالن غذاخوری که دری به آشپزخانه دارد و شامل ۲ قسمت بزرگ و یک رختشوی‌خانه است. از پشت آشپزخانه و از طرف باغ یک در دیگر جداگانه به طبقات بالا راه دارد که زیاد مورد استفاده قرار نمی‌گیرد و پله‌های آن قدیمی است و تعمیر نشده و افراد از پلکان چوبی که نزدیک ناهار خوری است استفاده می‌کنند. اما قسمت‌های متعدد دیگر تعمیر شده و جالب است بدانید که دو قسمت چوبی شومینه هر کدام در یک سال متفاوت تعمیر شده است.

از دریاچه‌ای که در فیلم و عکس‌های قدیمی دیده می‌شود خبری نیست و به صورت یک مرداب بزرگ در آمده دیگر پلی وجود ندارد و خشکی به طرف دریاچه پیشروی کرده است.

آهنگهای قشنگی به زبان اسپرانتو برای گریزیون و زبان اسپرانتو می‌خواندند که خیلی جالب بود.

مطالب برگرفته از کتاب گریزیون که همگی کپی بودند حاکی از آن است که قصر در دو کیلومتری بوژه واقع است. اولین گروه اسپرانتیست در قصر گریزیون در سال ۱۹۵۹ اقامت کردند.

یک سنگ بزرگ در محوطه باغ دیده می‌شود که گویا شروع زبان اسپرانتو در ۱۸۸۷ را نشان می‌دهد.

اولین کمپ در گریزیون در سال ۱۹۶۰ به نام

lecamptenatinata کمپ

گریزیون.

در قسمت پشت و در انتهای باغ دری چوبی و کهنه وجود دارد که به فضایی بزرگ و سبز و زیبا باز می‌شود. افرادی که با ماشین و چادر می‌آمدند آن‌جا را به مبلغ شبی ۳ یورو اجاره می‌کردند. سه تا حمام و ۳ تا دستشویی برای کمپی‌ها نزدیک در چوبی وجود دارد. آن‌ها برای صبحانه و ناهار و شام مبلغ ۱۰ یورو پرداخته و از قصر گریزون استفاده کرده و در تمامی برنامه‌ها شرکت می‌کردند. ناتالی فرانسوی و یکی دیگر از دوستان فرانسوی دیگر او با مادرش

که هم کلاس من بودند و چند نفر دیگر در کمپ اقامت داشتند. البته خیلی خوب به آن‌ها رسیدگی نمی‌شود.

انبارهایی از روغن ماشین و لوازم یدکی هم آن‌جا بود که کار مسافرانی را که با ماشین آمده بودند راه می‌انداخت.

ستاره معروف اسپرانتو بدون گل و تنها در پشت قصر به‌جا مانده است.

ژانیک که دبیر ریاضی است این ساختمان را اجاره کرده و به اسپرانتودانان اجاره می‌دهد. این پانسیون هر ساله فقط یک ماه در تابستان و سپس یک هفته در اکتبر

باز است و باقی اوقات به دلیل سرمای زیاد آن‌جا و هزینه گران و بالای سوخت تعطیل می‌باشد.

به نظر من قصر گریزیون با آن درختان سر به‌فلک کشیده و زیبا و سبز تکه‌ای از بهشت است. راستی تا یادم نرفته بگویم که مشوق من در رفتن به گریزیون سرکار خانم ناهید فریدنیا بودند که سال‌ها قبل از آن‌جا دیدن کرده بودند و آنقدر گفتند و گفتند تا من با همراهی و همدلی و همکاری جناب آقای مهندس شفیع راهی شدم.

امیدوارم در سفر بعدی اسپرانتیستی با شما همراه باشم.

### بازخوانی نقلی در گذشته و یادآوری برای امروز

چندی پیش در گفتگو با دوست و اسپرانتیست عزیز آقای محمدرضا ترابی نوشته‌ای از ایشان تداعی شد که جا دارد هنوز یادآوری شود. باهم بخوانیم:

”پیشاهنگ کسی است که راه ایجاد می‌کند، راه‌های نارفته را می‌پیماید و راه‌های ناهموار را هموار می‌سازد تا دیگران از آن استفاده کنند. کار پیشاهنگ ساختن است و پیراستن. پیشاهنگ می‌کارد تا دیگران بخورند. پیشاهنگ می‌رود تا دیگران در پی بیابند. پیشاهنگ مشعل‌دار است تا دیگران راه را بیابند.

پیشاهنگ آرمان‌گرایی است که عمل می‌کند (ایده‌آلیست و در عین حال پراگماتیست!)

پیروان کسانی هستند که در پی می‌آیند با انگیزه‌های بسیار گوناگون و معمولا خالی از آرمان. راه‌های هموار را می‌پیمایند و به عبارتی ”مصرف‌کننده“ هستند، ”استفاده‌کننده“ هستند تا ”سازنده“.

بسیار شنیده‌ام که کسانی می‌گویند «هر وقت همه اسپرانتو را استفاده کردند من هم شروع به آموختن آن خواهم کرد» و یا «اسپرانتو کی جهانی خواهد شد؟». حتی کسانی هم ابراز ناراحتی می‌کنند که چرا به جای اسپرانتو، انگلیسی یاد نمی‌گیرید؟ (گویی آن‌ها در خود احساس تشری نسبت به هدایت دیگران دارند)

باید گفت طرفداران این تئوری کسانی هستند که تابع‌اند و ”پیرو“، آن‌ها با ”موج“ همراه‌اند و راه‌های هموار را دوست‌تر می‌دارند - که این به خودی خود هیچ بد نیست و چه بسا ”عقلانی“ نیز باشد - اما آن‌ها به ما این حق را بدهند که هم چون آنان نیندیشیم و در جستجو و ایجاد راه‌های ”عقلانی‌تری“ باشیم!

موسسه سبزاندیشان، انجمن اسپرانتوی ایران  
برای تقویت فعالیت‌های فرهنگی اسپرانتو، گسترش و  
به‌کارگیری این زبان و حمایت از اسپرانتو، همه‌ی  
علاقه‌مندان و دوستداران را به عضویت دعوت می‌کند:

کلاس‌های حضوری در سه سطح پایه، متوسط،

پیشرفته: [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir)

09122099888

کلاس‌های مکاتبه‌ای اینترنتی:

[siminemrani@gmail.com](mailto:siminemrani@gmail.com)

سخنرانی‌های ماهیانه به زبان اسپرانتو

نشست و گپ و گفتگوی اعضا و علاقه‌مندان در هر

ماه با موضوع آزاد

انتشار فصلنامه در دو بخش فارسی و اسپرانتو با

موضوعات فرهنگی و علمی

... و



*Pajam-e Sabzandišan (Mesaĝo de Verdpensuloj)*

ISSN 1728-6174

IRANA ESPERANTISTO  
Kultura kaj sendependa sezon-revuo internacia.

\*\*\*

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj kontribuajtoj kondiĉe ke ili ne estu publikigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj kontribuajtoj ĉu en Esperanto ĉu en la persa.

Ĉia presa aŭ elektronika citado aŭ eldonado de materialoj de IRANA ESPERANTISTO, ĉu originale ĉu tradukite en aliajn lingvojn, estas permesata. Bonvole menciu pri la fonto kaj la originala lingvo (t.e. Esperanto aŭ la persa) kaj se eble, informu nin pri eldonaĵo en kiu aperis io de aŭ pri IRANA ESPERANTISTO aŭ/kaj sendu kopion al ni.

\*\*\*

**Grafikaĵo kaj enpaĝigo: Sabzandišan**

\*\*\*

TTT-ejo : [www.espero.ir](http://www.espero.ir)  
Retpoŝto: [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir)




۲۵

25



Persa kovrilpaĝo:  
Kastelo "Grizijono"  
Ni havas specialan raporton pri la kastelo fare de irana vojaĝinto tie.



E-a kovrilpaĝo:  
Irano, invitita al la  
100-a Esperanta  
kongreso.  
Irana reprezentanto  
raportas.


## E-a parto

La 100-a japana Esperanto Kongreso: H Shafiee	26
Novajtoj pri la Irana Esperanto-Movado	30
Inaŭguro de Unua Esperanta Muzeo en Ĉinio: Tradukis: Saead Borhani	31
Libroprezento: Verso de persoj	32
Woittek (soldet-urso) en pola armeo: F. H. Solat	33
Kiel ni vivas nun... : H. Shafiee	34
Andorra, Stranga Lando: K Sayadpour	35
Ekovilaĝo: Savanta Solvo? : A. R. Mamduhi	36
Naskiĝo: Poemo de Maryam Nezami	40

## Persa parto

Al nia legantaro: Hamzeh Shafiee	3
Novajtoj pri la Esperanto-Movado en la mondo:	5
Inaŭguro de Unua Esperanta Muzeo en Ĉinio: Omid Rohanian	6
Esperanto en tornistro, Parto la 9a, Tradukis: Simin Emrani	7
Esperanto Monumente, parto: la 7a, Tradukis: R. Párto	12
Woittek (soldet-urso) en pola armeo: F. H. Solat	15
Andorra, Stranga Lando: K Sayadpour	19
Vojaĝ-raporto pri kastelo Grizijono: Farzaneh Hakim-Ghods	21

# Raporto



La 8-an de Oktobro

## Esperanto ligas homajn korojn --- de la pli ol 100-jara historio al estonteco

Hodiaŭ, la 8-an de oktobro, mi nun estas en tehrana flughaveno kaj nun estas 15:30. Mi atendas por la tempo kiam mi rajton rajdi aviadilon kaj forflugi je 17:05. Ŝajnas ke ĉio estas en ordo. Sed ne! ĉio ne estas en ordo. La aviadilo prokrastas por preskaŭ unu horo. La kialo ŝajne estas eraro en enmetado de valizoj, ĉar el la fenestro de la aviadilo mi vidis ke laboristoj elaviadiligas la pakaĵojn. Poste ili alportis aliajn serion da valizoj kaj enmetis en la aviadilo. Same la flugo atingis al Abu-Dabio unu horo malfrue, sed feliĉe ĉio glate antaŭeniris kaj mi ĝustatempe ĉiuj necesajn paŝojn faris.

Mi eniras la aviadilon ĝustatempe, sed ankaŭ ĉitie la flugo prokrastas kvankam ne tro multe, nur iom malpli ol duonhoro. Do ne tio ĝenas. En la aviadilo estas malvarma pro la forta klimatiziloj. Krome eblas utiligi sendraston interreton (wi-fi) dum la flugo en la aviadilo. Sed kiel ni jam al kutimiĝis, tio ne estas utiligebla por ni irananoj, ĉar la koston de uzado oni pagas per kredit-kartoj aŭ pere de sia telekomunikada kompanio poste kune kun la kostoj de sia telefono. Ambaŭ estas ne realigebla por ni irananoj.

Hodiaŭ estis iom peza tago por mi. Matene en oficejo, tagmeze en hejmo, post-tagmeze en flughaveno kaj vespere en aviadilo kaj poste en la flughaveno de Abudabio, kaj nokte denove en aviadilo. En aviadilo de Tehrano al Abu-Dabio oni servis per rizo kaj koko. Aldone estis salato kaj ĉokolado. Ankaŭ pano kun fromaĝo estis donita. Mi manĝis la tuton. Sed ankaŭ dum la flugo de Abu-Dabio al Tokio estis servita la vespermanĝo. Mi elektis pastaon inter la elektebla menuo kiu inkluzivis ankaŭ japanan manĝaĵon kaj fiŝon. Mi vere ne estis malsata, tamen mi manĝis la pastaon kun 7-up kaj salato kaj glaciaĵon. Ĝi estis bongusta.

En la aviadilo al Tokio, sur la apuda seĝo estas sidanta Japana filino kiu ŝajnas esti tre malsana. Ŝi la tutan tempon tremas pro malvarmo kaj ŝia kapo estas subfalita. Mi klopodis helpi ŝin per doni litkovrilon kaj demandi ŝin se ion mi povus fari por ŝi. Sed ŝi estas fermita homo kaj ne akceptis ajnan helpon. Poste mi iom timis ke mi ankaŭ fariĝos malsana ĉar mia kapo komencis dolori. Feliĉe poste kaj mi kaj ŝi endormis kaj mi sentis pli bona.

## La 9-an de oktobro

Je la 2a ptm laŭ la loka tempo mi estas en Narita flughaveno. Jen denove japanio. Kial mi tiel multe ŝatas -aŭ eĉ povas diri- amas Japanion? Estas proverbo en Irano kiu ne kosideras iun ludon aŭ laboron se ĝi ne estas farita jam minimume trifojoj, tiele tri estas la simbolo por konsideri ion kompleta. Kaj por mi estas la tria vojaĝo al Japanio. Nun mi povas opinio-doni pri Japanio (ĉu vere?). Per 6000 ŭenoj mi aĉetas bileton por ir-reveno de flughaveno al la urbo kaj inverse kune kun du sinsekvtaga bileto de metroo. Mi ne certas ĉu ĝi estis ekonomia solvo aŭ ne, sed ŝajnas ke estos bona propono.

Mi demandis la turisman informojon pri senpaga



۲۷

27

sendrasta konekto al interreto kaj ili donis min mapo de Akihabara strato en kiu mi povus trovi karton por tiu celo. Per aŭtobuso kaj poste per metroo mi atingas la oficejon de JEI. Estis bona etoso preparante por la kongreso. Mi atingis tie je la 5a, kaj post iom da interparolado kaj alveno de aliaj, ni iris en la apuda restoracio por vespermanĝi. Tre intimaj kaj amikaj homoj. Mi pripensas ĉu vere eblas trovi homojn pli afablaj kaj amikemaj ol esperantistoj? Post la vespermanĝo kaj adiaŭo kun aliaj, mi kun Akiko kaj ŝia edzo iras al oomoto centro kaj tie mi estas prezentata japanstilan ĉambron por tranokti. Estas bna sperto. Post fari duŝon en Japanstila publika banejo, kaj skribi pri la dumtagaj eventoj, mi tre rapide endormiĝas

## La 10-an de oktobro

Je la 6a mi vekiĝis kaj komencis prepariĝi por tago plena de aventuroj. Antaŭ la sepa mi aŭdis homan voĉon kiu ŝajnis al mi kiel alvoko al preĝo. Do, mi tuj iris al la 3a etaĝo por akompani japanajn amikojn por la preĝo. Nu, estis bona sperto! Poste en la manĝejo, mi manĝis japanstilan matenmanĝaĵon. Je la oka matene mi forlasis la Oomoto-centron kaj la tutan tagon mi pasigis vagabante la stratojn. Mi estis ege laca kiam mi revenis al la centro je la 8a horo. Do, mi tuj banis kaj dormis.

## La 11-an de oktobro

Hodiaŭ mi devas forlasi la Oomoto-centron kaj ekloĝi en la hotelo rezervita pere de JEI. Same kiel hieraŭ mi vekiĝas je la 6a kaj prepariĝas por foriro. kiam tute preta, kaj post la alvoko al preĝo, mi iras al la tria etaĝo kie jam aliaj pretiĝas por preĝi. post la preĝo, la matenmanĝon mi manĝas en amika etoso. Post la matenmanĝo, mi enpakigas ĉion en mia ĉambro kaj prenante la valizon iras al la akceptejo. Donacinte la iranajn nuksaĵojn, mi iras al la metro stacio kaj post ne tiom longa tempo atingas la celon. La hotelon mi tre facile trovas helpe de la mapo kiu estis printita en Oomoto centro kun foto de la konstruaĵo. Fakte mi pensas ke ne estis ebla trovi la lokon sen la foto de la konstruaĵo, ĉar la hotelo ne havas tabulon aŭ

mencion en iu latin-litera lingvo. Mi eniras la hotelon kaj kvazaŭ oni atendis min, ĉio estas preta. En la ĉambro mi iomete ripozas kaj poste je la 2a ptm mi forlasis la ĉambron cele al la kongresejo. En lobia mi renkontas s-ino Tume kaj S-ro Jasuo kaj la invititoj el Taĝikio kaj Indonezio. Post kelkaj minutoj, mi iras al la kongresejo, sed la s-ino ĉe la informejo diras ke hodiaŭ ne estas iu persono tie kaj ke la kongreso komenciĝos ekde morgaŭ. Mi revenas al hotelo kaj kune kun ĉina esperantisto denove iras al la kongresejo. Li sciis ke kelkaj homoj estas jam en la kongresejo preparante la aferojn. Ni ricevas niajn kartojn kaj kongreslibron. Mi interbabilas por kelkaj minutoj kaj kiam ĉiuj pretas, ni kune iras por vespermanĝi en restoracio proksime al la hotelo. Poste kunekun Jasuo kaj vietnama Nepo kaj taĝika Mehrangez kaj Indonezia Iyan ni iras al la granda vendejo kaj rapide rigards la varojn.

Ne estas tiom malfrue kiam mi revenas al hotelo kaj post kontakti la familon kaj kolegojn dormas.

## Sabate la 12-an de oktobro

Jen la unua tago de la kongreso. Matene estas nur programoj por junuloj. Unu por komencantoj kaj alia por iom pli progresantoj. Ĝuste por

kunhelpi Mehrangez, mi decidus ĉeesti en la komencanta kunsido kiu estas tamen bona. Por la tagmanĝo mi iris al la sama vendejo kie mi vizitis pasintnokte kaj aĉetis pretigita kokaĵoviando. En hotelo mi varmigas ĝin per mikro-ondilo kaj manĝas. Posttagmeze okazas prelegon temante "kiel ni organizas esperanto kunvenon?". Poste estas inaŭguro. La inaŭgura ceremonio estas bone organizita. Mi kaj aliaj ses invititoj sidas malantaŭ la tablo sur la podio. Post la salut-mesaĝoj de Mark Fettes, urbestro de Tokio, kaj aliaj altrangaj respondeculoj, ni, invititoj laŭvice laŭlande en alfabeto ordon salutas. Jen la teksto de mia salut-mesaĝo:

### Saluton karaj ĉeestantoj! Mi venas el Irano!

Kiel la partoprenanto veninta el la plej okcidenta parto de Azio al la plej orienta lando de tiu ĉi vasta kontinento. Mi kunportas plej elkorajn salutojn kaj bondezirojn al la partoprenantoj de la 100-a Japana Esperanto Kongreso kiu certe estas tre grava evento en la historio de Esperanto-Movado en la mondo kaj precipe en Azio.

La japana esperantistaro nun povas esti fieraj por atingi la 100-an kongreson. Mi certas ke okazigi tiun ĉi kongreson estis revo por japanoj dum multaj jaroj. Nun tiu revo realiĝis. Ni daŭre revu por pli grandaj sukcesoj, kaj estu certaj ke niaj revoj iam realiĝos.

La irana Esperantistaro sendas korajn bondezirojn kaj gratulojn al japanaj samideanoj.

Estu tiel ke tiu ĉi pli ol cent-jara historio gvidu nin al pli brila, homaraneca kaj paca estonteco.

Dankon!

Poste estas kelkaj programeroj kaj je la 6a estas la bankedo. La bankedo ankaŭ estas bone organizita kaj mi ĝuas la tempon. Fine estas la programo por danco kaj muziko kiun Jomo gvidas. Post tio mi revenas al la hotelo kaj farinte la kontaktojn, pretiĝas por longa ripozo.



### Dimanĉe la 13-an de oktobro

Prenante enmane la kongresan libron, mi plenigas la tagon. Estas sufiĉe variaj eblecoj por elekti laŭdeziran temon kaj partopreni ĝin. Fakte ŝajnas al mi ke la respondeculoj de la kongreso

multe klopodis ke ilia 100a kongreso estu kiel eble plej simila al universala kongreso. Kaj laŭ mi ili je bona grado sukcesis tion fari.

Poste venas la kunsido de oomotanoj kiujn mi nur duon-hore partoprenas. Mi devas iri al la fermita kunsido "Azia Agado".

Por la vespermanĝo ni estas invititaj al Oomoto centro. Post la programo, mi sole revenas al la hotelo.

### Lunde la 14-an de oktobro

Matene prelegas Osmo Buller kaj poste venas la prelego de Lee Jungkee, ambaŭ tre interesaj. Post la tagmanĝo, Mi partoprenas en la programo en kiu oni prezentas la erojn de japana kulturo. De skribo ĝis origamio kaj ludoj. Poste mi kaj aliaj landaj reprezentantoj prezentas niajn raportojn pri la movado en niaj landoj.

### Marde la 15-an de oktobro

Kaj la lasta tago de la kongreso. Tiel rapide pasis la kongres-tempo. Pro la tempo bezonata por paki ĉion kaj forlasi la hotelon, mi iom pli malfrue iris al la kongresejo. Tamen ankoraŭ restas preskaŭ unu horo ĝis la komenciĝo de la ferma ceremonio kiu estas je la 10:30. La programo konsistas el raporto de la kongresa prezidanto, prezento de LKK-anoj, prezenti la premiitojn kaj la gajnintojn en la oratora konkurso.



Duon horo post la ferma ceremonio, tiuj kiuj havas la ekskursan planon kolektiĝas ĉe la ĉefa pordo por enbusiĝi kaj veturi al Tokio Ĉiel-arbo (Skytree). Bedaŭrine la vetero ne estas bona por tiu ekskurso, sed ĉio jam estas de antaŭe planita. Post la ekskurso kaj tagmanĝo en restoracio kune kun Imanoru, Ŝaŭgi, Iyan kaj Masako, ni iras al la metrostacio, de kie Masako, Iyan kaj mi ekkomencas nian vojaĝon al Kioto per la rapid-trajno ŝinkanseno. La trajno ekas je la 19a kaj atingas al Kijoto je la 21:18. Daŭre pluvas kaj mi en



la stacidomo legas la reklamon kiu avertas pri la alveno de tajfuno. Ni rajdas buson por atingi al la hejmo de familio Tahira. Tie ni post iom da babilo kaj trinki teon ekdormas. Noktomeze venas S-ro Minoru kiu forlasas la hejmon tre frumatene.

### Merkredo 16-an de oktobro

Matene s-ino Masako preparas matenmanĝon per ovo kaj cepo! kiu inkluzivas kafon, margarenon kaj panon. Post la matenmanĝo, ni kune iras al la proksima templo. Tie ankaŭ troviĝas ĝardenon kiun ni ankaŭ vizitas sen s-ino Masako. Kiam ni eliras de la ĝardeno, nin atendas s-ino Masako kaj aliĝas al ni s-ino ... kaj post kelkaj minutoj s-ino .... Nori? Ni kvinope tagmanĝas en restoracio kaj post kelkminuta butikumado, iras al la esperanto-domo kie okazigas kurson por komancantinoj. Esti inter entuziasmaj geesperantistoj estas interesa. Ijan lernas kiel vesti kimonoon. Fine de la kurso alvenas s-ino Masako kiu je la komenco de la kurso jam forlasis nin.

Denove ni triope iom promenadas en la urbocentro kaj poste vespermanĝas en itala restoracio kaj denove revenas al la Esperanto-domo kie okazas la vira kurso por laborantoj. Ni multe babilis kaj revenis hejmen post la fino de la kurso.

### Ĵaŭdo 17a de oktobro

Matene ni vizitas la muzeon de paco kaj posttagmeze ni vizitas la muzeon de Mangao. La tagmanĝon ni manĝas en studenta manĝejo de la universitato. Por la vespermanĝo ni kunvenas en persa restoracio.

### Vendredo 18a de oktobro

La tutan tagon ni vizitas muzeojn kaj kastelojn kaj templojn. Vespere antaŭ ol viziti s-ro Kobajaŝi en stacidomo, ni iras al teatraĵo kie oni montras kelkajn ecojn de japana kulturo dum unu horo. La programeroj estas varia, de te-ceremonio ĝis la pup-danco. Poste ni kune kun s-ro Kobajaŝi kaj s-ro Minoru vespermanĝas en restoracio. Ijan foriras

kun s-ro Kobajaŝi kaj mi restas kun la familio Tahira. Revenante hejmen, ni nelonge sidas en la persa restoracio kaj interparolas kun Araŝ kiu servas nin per du teoj.

### Sabate 19a de oktobro

Frumatene je la 7a mi kaj s-ro Minoru iras al la stacidomo por rendevui ljan kaj de tie ni iras al Nara kie nin atendas Nara Esperanto-societanoj. Ni por preskaŭ unu horo interbabilas kaj poste kune kun s-ro Kimoto turismas en Nara. La pejzaĝoj estas vere belaj. Laŭ la plano, ljan iras al Hiragata kaj mi revenas al Tokio.

### Fino

Kaj mi restas du noktojn en Oomoto-centro denove. Dimanĉe pluvegas la tutan tagon. Mi iras al Ŝinĝuku-kvartalo por kaj viziti ĉirkaŭaĵojn kaj eble ion aĉeti kiel suveniro. Sed la vetero ege malfaciligas ajnan vagadon tra la stratoj. Do, frue vespere mi revenas al la centro.

Lunde matene mi unue iras al Tokio stacidomo por trovi la bus-stacion de kie mi devus veturi al la flug-haveno. Poste mi per metroo iras al JEI. Bedaŭrinde JEI estas fermata lundoj. Tion mi ne sciis. Do, mi iras al Ginza stacio kaj tie vizitas mallonge Konsturaĵon de Sony kie okazigas ĉiama ekspozicio pri la produktoj de Sony.

Je la 16-a ptm mi iras al Tokio-Stacio, de kie veturas la buso al la flughaveno Narita. Mia flugo estas je la 21:20. Ĉio facile kaj senprobleme antaŭeniras kaj frumatene mi estas en Abu-Dabio. Post 10-hora restado en Flug-haveno de Abu-Dabio, mi flugas al Tehrano. Vespere je la 18:20 mi estas en Tehrano.

Tiel rapide pasis la tagoj. Mi denove spertis vivon en lando kie multaj konsideras ĝin kiel pioniro en teknologio. Ofte estas tiel ke ni perceptas en Japanio ĉion oni eblas trovi pli malmultekoste, ĉar tie estas la origino kaj la produktejo. Sed tiu imagino ne veras. Mi trovis ke la prezoj de sama produkto ne estas pli malaltpreza ol en Irano. Krome estas la problemo ke por trovi ion digitalan varon oni devas multe serĉi, ĉar preskaŭ ĉie oni vidas produktojn specialajn por japanoj kun ĉiuj signoj kaj menuoj kaj butonoj en japana lingvo. Por trovi ion taŭgan por eksterjapanio, oni devas trovi unue la vendejon kiu havas tiajn produktaĵojn.

Kaj mi trovis Japanan Esperanto-movadon prosperanta kaj aktiva. Ĉiuj laboras sindoneme por la progresigo de la movado. Mi kore dankas ĉiujn kiuj helpis min por havi tiun ŝancon partopreni en la 100-a japana Esperanto kongreso kiu estos neforgesebla evento en mia vivo.

Ĉu iam en Irano ni ankaŭ povus okazigi 100-an nian kongreson? Ni esperu kaj faru la unuajn paŝojn por atingi al tiu ĉi revo.

**Hamzeh Shafiee**

# Novajoj pri la Irana Esperanto-Movado

## Forpaso de la elstara kaj la unua eldonisto de Esperanto-libroj en Irano

La forpasinta S-ro Ahmad ATAI estis la plej unua eldonisto en Irano kaj dum mult-jaroj eldonadis E-librojn ĉefe lernajn.



Ankaŭ irana fama verkisto Esperantista (patro de Esperanto-movado en Irano) kaj psikologo prof. M.H. Saheb-zamani multajn verkojn originalajn divers-teme ĉefe Esperantajn eldonadis en lia eldonejo.

Do multaj Esperantistoj ŝuldas S-ron Atai kaj lian eldonejon samnoman pro Esperantaj eldonaĵoj dum duon-jarcento!

Kondolencon al estimataj inĝeniero Behruz ATAI kaj s-ro Majid ATAI, ambaŭ esperantistoj kaj liaj filoj, kaj gefamilianoj funebrantaj; esperante sanecon kaj paciencon al liaj post-restantoj.

Raporto: Reza Kheirkhah

Foto: Farzaneh Hakim-Ghods



Laŭ la opinio de la prezidanto de IREA, la monata prelego kiu okazis la 26-an de Oktobro estis unu el la plej interesaj prelegoj dum la historio de tiuj kunsidoj. La surpriza vespermanĝo kaj bonega gastigado de s-ino Dortaj, bunta programo, kaj ĉeesto de preskaŭ 25 ĉeestantoj, interalie s-ino Faraji, varmigis la etoson. La programo inkluzivis:

- Prelego de s-ro Mamdoohi pri "Springboard projekto"
- Filmo pri Gresillon kastelo

-Anonco de s-ino Faraji kiel nova honora membro de

IREA, kaj kontribuo de s-ino Mamdoohi al la projekto E-domo

-Raporto de s-ro Shafiee pri partopreno en 100-a Japana E-Kongreso



Marde la 1-an de Septembro prelegis D-ro Sayadpour pri "Trapasi lingvaj barilojn: ĉu nur per Esperanto?" kaj "Stranga lando" en IREA-oficejo ekde la 18-a. Ankaŭ samtempe la partoprenantoj festis la 8-an naskiĝtagon de Monataj Prelegoj.




Dimanĉe la 8-an de septembro okazis la regula ĉiumonata programo MoRo (Monata Renkontiĝo). En la kunsido raportis S-ino Dortaĝ pri Grizijono. La tekston de ŝia raporto oni povas trovi en la persa parto de tiu ĉi revuo.

IREA programo por Zamenhof-tago okazos ĵaŭde la 21-an de Azaro (12-a de decembro). La loko estos anoncata poste sed ĝi komenciĝos je la 16-a.

Ĵaŭde la 22-an de aŭgusto en la oficejo de IREA prelegis s-ro Murat Ozdizdar, fama aktiva turka esperantisto kaj la motoro de turkia esperanto-movado. La temo de la prelego estis "Turkio kaj turkia e-movado".

## Inaŭguro de Unua Esperanta Muzeo en Ĉinio



JINAN, la 18a de Novembro (Xinhua) – La unua Esperanta muzeo oficiale inaŭguriĝis post pli ol 2 jaroj de konstruado por promocii la ‘Universalan Lingvon’.

La Esperanto muzeo en Zaozhuang- universitato en orienta ĉina provinco Ŝandong sabate inaŭguriĝis post gastigi pli ol 7000 vizitintojn dum prova operacio de Majo.

Sun Mingxiao, la respondeculo de la centro deklaris: “ La muzeo havante spektaklon kovrante 680 kvadrat-metran areon estas la plej granda je sia tipo en Azio.”

Ĝi fanfaronas de pli ol 26,000 objektojn kiel librojn, gazetojn, fotojn kaj manuskriptaĵojn. La plej multaj de ili donacitas de Esperantistoj el pli ol 40 landoj aŭ regionoj.

Chen Haosu, la ĉefo de la ‘ Tut-Ĉina Esperanta Ligo’ klarigis ke la misio de la muzeo estas registri la historion de Esperanto, promocii la kulturon de la artefarita lingvo kaj sian evoluadon.

La muzeo estas konstruita de Zaozhuang Universitato kaj la ‘ Tut-Ĉina Esperanta Ligo’ komune kostinte 490,000 Uson-dolarojn.

Esperantaj agoj komenciĝis en la universitato en 1980 jardeko. Esperanto fariĝis alternativa kurso en la kolegio en 2011 altirante pli ol 500 studentojn ĝis nun.

Laŭ Sun ĝis nun preskaŭ 400,000 ĉinoj lernis Esperanton.

Esperanto kreiĝis de Pola D-ro L. L. Zamenhof en 1887 kaj prezentiĝis al Ĉinio en la komenco de 1990 jardeko.

[http://news.xinhuanet.com/english/culture/2013-11/18/c\\_132897910.htm](http://news.xinhuanet.com/english/culture/2013-11/18/c_132897910.htm)

**Traduskis E-en: Saeed Borhani**





**Kolekto de originalaj esperantaj poemoj verkitaĵ de iranaj esperantistoj.**

La poetoj laŭ alfabeto ordo estas:

Ŝirin Ahmadnia,  
Alireza Dowlatshahi,  
Simin Emrani,  
Abdolah Hakimnejad,  
Ahmad Reza Mamduhi,  
Narges Goli-Zadeh Monsef,  
Marjam Nezami,  
Hejdar Raŝidi  
Keyhan Sayadpour.

La kolekto inkluzivas 64 poemojn, el kiuj 21 (33%) jam aperis en ekster-iranaj revuoj (Brita Esperantisto, Fonto, Heroldo de Esperanto, Kiosko de Levanto, Kontakto, Monato, Penseo, kaj Riveroj), 22 (34%) en iranaj revuoj (Irana Esperantisto kaj IREJO-bulteno), kaj 21 (33%) estas unuafojaj aperintaĵoj.

Valora verko por konatiĝi kun irana kulturo, iranaj esperantistoj kaj irana Esperanto-movado.

*Mendi la volumojn ĉe: [info@espero.ir](mailto:info@espero.ir)*

ISBN 978-80-89366-03-3



9 788089 366033





## Woitek (soldet-urso) en pola armeo!

Kolektita kaj verkita pere de F. H. Solat

**Post reveno el Pollando al mia lando, alvenis ret-mesaĝo kies enhavo estis tre interesa kaj mirinda por mi.**

**Tiu mesaĝo ankaŭ enhavis kelkajn fotojn malnovajn pri tiu urso akompanante polajn soldatojn dum milito kiuj aspektis kiel veraj fotoj (sen uzo de artaj rimedoj)!**

**Do mi sendis la ret-mesaĝon al kelkaj miaj novaj geamikoj en Pollando demandante ilin pri tiu urs-soldato! Preskaŭ neniu havis ian informon pri ĝi. Nur Stanislaw Mandrak (prezidanto de PEA) skribis min ke tiu nomo tre agrablas en Pollando, sed nenio alia informo!**

**Poste mia amikino pola konfirmis ke Jes! Jes! Tio estas vera rakonto kaj ĝi onidire partoprenis en dua mondmilito kune kun polaj soldatoj!**

**Do mi mem en Google kaj interreto serĉis pri tiu fenomeno kaj jen la rezulto:**

**Kio estas rakonto malnova pri urso-soldato?**

Post finiĝo de dua mond-milito arestitaj polaj soldatoj estis senditaj al Siberio. Stalin decidis batali kontraŭ aliancaj armeoj kaj uzi liberigitaj polaj soldatoj tiucele. Do soldatoj enrajniĝis kaj trans Irano sendiĝis unue al Palestino kaj poste aldoniĝis helpi al 8-a armeo de Britujo por invadi Italujon, aŭ fakte militi kontraŭ itala armeo kiu estis unuiĝinta kun la germana armeo (Nazia).

Transirante Iranon, pola armeo renkontis mizeran junulon (eble veninte el Hamedan, urbo en okcidenta parto de Irano) kiu havis grandan sakon same kiel sako de vestaĵoj. Ili nutris tiun junulon kaj demandante pri tiu sako eksciis ke ĝi enhavis ursidon kiu estis disigita de sia



patrino (Onidire tiu ursido estis kaptita en montaro de Alborz aŭ Zagros; kiuj estas du gravaj montaroj de Irano). Do ĝi bezonis kaj nutradon kaj prizorgadon! Ili



aĉetis tiun ursidon kontraŭ moneroj aŭ (eble) kontraŭ kelkaj konservitaj manĝaĵoj kiujn li certe bezonis. Soldatoj nutris ĝin per varma lakto kaj prizorgis en varma loko.

Iom post iom ĝi kreskis kaj fariĝis ano de armeo, nome Voytek. Ĝi amis cigaredon,

ne por fumi sed por manĝi, kaj drinkis bieron rekte el botelo! Ĝi multe helpis polan armeon; lernis kielmaniere kunmeti militajn skatolojn de armilo en trakoj, ... ĝi vere sentis sin same kiel membro de milit-familio.

Post finiĝo de milito oni sendis ĝin al Edinburgh- bestĝardeno kie ĝi ofte kaŝis sin en kavo kaj ne havis reason al popoloj kiuj venis por viziti, sed nur al polaj eks-soldatoj!

Ĝi forpasis kiam estis 22 jar- aĝa! Ĝiaj statuoj estas starigitaj en Polando, batal-muzeoj de Edinburgo, Londono kaj Kanado.

Vivo de tiu urso filmiĝis pere de Martin Vennardo uzante kartonojn kaj multajn fotojn trovitajn pri tiu urso.

Ĝia ŝton-memoriga monumento nuntempe staras en zoo de Edinburgo, ĝia lasta loĝejo, ankaŭ diversaj remomrigaĵoj stariĝis en batal-muzeoj de Otava, Skorski kaj Londono.


Oni pridiskutas starigi ĝian grandiozan monumenton, kvazaŭ vera urso, en Krakovo, aŭ Zagano, aŭ Varsovio ĝis 2014.

## Kiel ni vivas nun ...

Matene kiam vi eldomiĝas, kiam ajn, ĉu frue ĉu malfrue, vi vidas tumulton surstrate. Plejmulto estas edukita. Plejble pasint-nokte plejmulto de ili spektis satelitajn televid-kanalojn por kelkaj horoj; vagadis longe en interreto, interŝanĝis kelkajn ret-mesaĝojn, vizitis Fejsbukon (Facebook), kaj eĉ eble iom Twitter-umis. Ĉio tio estas malgraŭ la severa filtrado de la reto kaj la pli-forta parazit-elsendado sur satelitaj ondoj. Sed ĝenerale la homoj ne povas akcepti esti apartigitaj de la cetera mondo. Plejmultaj irananoj, kiel ajn, trovas sian vojon por konektiĝi al la ekstera mondo. Ili avidas vidi kaj aŭdi kiel eble plej multe pri ĉio kio iras tra la mondo.

Se vi pli atente rigardas ilin, iliaj aspektoj, iliaj kostumoj, kaj eĉ iliaj mienoj apenaŭ varias. Plejmulto de ili simple vestas sin per malhelaj vestaĵoj nigremaj. Mankas variaj vivigaj koloroj. Viroj ofte vestas simplan ĉemizon kaj pantalonon. Por virinoj tiu mal-varieco estas pli atentokapta. Krom tio, vi ankaŭ vidas ke multaj preter-pasantoj, precipe gejunuloj, havas fadenon kiu dubranĉiĝas kaj iras rekte en iliajn orelojn.

**Daŭrigo en paĝo 40**



## Andorra, Stranga Lando Ĉu vi konas tiun landon?

K. Sayadpour

### Andorra la bela

Andorra estas landeto inter hispanio kaj francio kun 85 mil loĝantoj kaj 468 kvadrataj kilometroj da surfaco. Charlemagne, granda imperiestro eŭropa, konstruis la landeton kontraŭ nordafrikaj islamanoj kiuj atakis hispanion dum 700-aj jaroj. Tiu bela landeto estas stranga. Sed kial?



- Andorra estas princlando kun du princoj: la episkopo de Urgell kaj franca prezidanto!
- Andorra ne bezonas vizon! Sed ĝi ne havas flughavenon. Do oni devas veni tra aŭ

hispanio aŭ francio kaj do havi Schengen-vizon!

- Andorra neniam havis monunuon. Antaŭ eŭro-erao, ambaŭ franca kaj hispana monunuoj estis uzataj, kaj nun eŭro anstataŭigis ilin.

La oficiala lingvo estas la kataluna. Sed la franca kaj hispana estas uzataj vaste.



- Andorra la Vella estas la ĉefurbo kun loĝantaro.

### Kial vojaĝi:

- Turismi: Andorra havas belan naturon idealan por skiado, montgrimpado kaj banado en mineralakvo.



Joan Enric Vives i Sicília  
current episcopal co-prince of Andorra since 12 May 2003.



François Hollande  
current French co-prince of Andorra since 15 May 2012.



- Aĉeti: Andorra estas imposta paradizo, do la varoj estas vere favorprezaj tie. Ĉokolado, parfumo, kaj hejmaj iloj estas tre malmultekostaj, kaj poste vestaĵoj.

### Kiel atingi:

Estas regulaj busoj de barcelona norda busstacio kaj ties flughaveno. La vojaĝo daŭras 3 horojn per rekta buso kaj 4 per haltanta.

## Ĵetrigardi muzaike al:

# Ekovilaĝo: Savanta Solvo?



*Elektita el: Parolado de A. Reza Mamduhi en Irana Esperanto-Asocio, Tehrano, la 24 de Jan. 2013*


### Enkonduko

La globa Varmiĝo devigis la homaron serĉi pri diversaj solvoj, unu el kiuj estas Ekovilaĝo.



### Difino de Ekovilaĝo

Ekovilaĝo estas tia vilaĝo, kiu estas organizita sur ekologiaj, naturamikaj principoj kaj estas loĝata de 10-50 ĝis 150 homoj.



### Ekologia piedspuro



### Bazoj de ekovilaĝo

La ekovilaĝo estas eta **komunumo** unuiĝinta sur ekologiaj, sociaj aŭ spiritaj valoroj (ekz. kredantoj de Hare-Kriŝna).



۳۷

37

### Ekovilaĝo: Savanta Solvo?

Ĝi konsistas el homoj, kiuj intence elektis: la alternativan vivstilon.



La loĝantoj trarompas la tradiciajn formojn de la komunuma kutimo,



La loĝantoj trarompas: la detruon de la natura loĝloko,



La loĝantoj trarompas la urban disetendiĝon, kaj agrikulturon,



La loĝantoj anstataŭ la elĉerpeblaj energifontoj provas uzi lokajn fontojn.



۳۸  
38

Tiu modelo de la kolektiva agado similas al tiu de Ten Thousand Villages, kiu apogas la samrajtan komercon de la varoj dismonde.



La principoj de ekovilaĝo aplikeblas ankaŭ por urbaj kaj provincaj komunumoj, samkiel en la evoluantaj kaj evoluantaj landoj.




Porparolantoj vidas la infrastrukturan sendependecon kaj la elteneblan vivformon (ekzemple, la volan simplecon) de la loĝantoj kun la minimuma komerco kun la ekstera mondo, ekoregiono.



Provincaj ekovilaĝoj bazatas sur organika kultivado, permakulturo kaj aliaj agmanieroj, kiuj antaŭhelpas la funkciadon de la ekosistemo kaj biodiverseco.



Ekovilaĝo ĝenerale laboras krom la supre menciitaj per:  
"verda" infrastruktura kapitalo;  
aŭtonoma konstruado aŭ kundomoj (angle Clustered Housing), por minimumigi la Ekologian piedspuron.



## listo de esperanto-elsendejoj

<http://karapacopanoramo.blogspot.be/2012/08/radioretadresaro-kunmetita-de-andreo.html>

“!\*.~.Ĉ ĉ .. Ĝ ĝ .. Ĵ ĵ .. Ĥ ĥ .. Ŝ ŝ .. Ŭ ŭ ..~\*!”  
 ㄹ .~\*” ~!“~-. ㄹ ㄹ .~\*”



- www.movado-sen-nomo.org/ (Esperanto voor BZN)
- www.esperanto.net = informoj en 57 lingvoj
- www.lernu.net = kursoj en 33 lingvoj
- www.edukado.net = pli ol 500 ekzercoj
- www.esperantio.net =Esperanto kiel kulturilon
- www.nitobe.info
- www.lingvo.info
- www.interkulturo.net
- www.informado.net
- www.komputeko.net
- www.artista.ikso.net
- www.aktuale.info
- www.komputeko.net

**De:**



**Kaj ...**

**Antaŭaj numeroj disponeblas**

Nomo:  
 Familia Nomo:  
 De numero:           Ĝis numero:  
 Adreso:  
  
 Poŝt-kodo:               Telefono:  
 E-poŝto:  
  
 Sendu la peton al la adreso:  
 E-poŝto: info@espero.ir  
  
 Bonan legadon,  
**Irana Esperantisto**

**Ĝis:**



**Ĉe [www.espero.ir](http://www.espero.ir) troveblas.**

*Daŭro de "Kiel ni vivas"*

Jes, ili ion aŭskultas! Sed kion ili aŭskultas? Vi ne scias certe. Sed vi povas diveni ke plejble ili aŭskultas muzikon de eksterlandaj kantistoj, ĉu nacilingve, ĉu fremdlingve. Kiam ili atingas al iu ĵurnal-kiosko, ili haltas kaj rapide trarigardas la ĉef-titolojn de la tagĵurnaloj. Ofte ili murmuretas ion ĉe si, kaj ekposte daŭrigas sian vojon.

Multaj havas poŝ-telefonon enmane, butonumas aŭ klakas sur ĝi, sendas mesaĝeton, ludas, rigardas klipon, aŭ legas tekston.

Koncize diri, ŝajnas ke ĉiuj serĉantas ion; kvazauŭ ili havas perditajon tre gravan, multe serĉindan. Eble mankas konektiga sento ...

Jes, ĉi-tiele vivas plejmulto de ni ...!

**H. Shafiee**

**Naskiĝo**

Vibras verv-o-ĝermetoj fakulte,  
 flirta flustro embria,  
 mi silentas aŭskulte  
 inspir-ebria,  
 deĉifro-dronite meditas mi  
 en profundo fantazia  
 de l' poezia maro  
 por perle poemi.

Kia maro sen fundo kaj lim',  
 se mi povus naĝi kuraĝe  
 laŭ ondaro de l' rim',  
 se mi povus remi poeme,  
 pure paroli brave,  
 sen barakti sub cenzur-ĉenoj sklave.

Fingroj fenomenaj  
 plantas en kor' poemo-semon  
 laŭ verda kutim' konduka  
 al nova espero  
 kaj regalas karesemon  
 suneska radiar' eduka  
 je plena prospero,  
 pluvas nubar' kultura,  
 favoras medio literatura.

Krevas patoso-ŝosoj fermente,  
 sur menso-petalo eksudas rosoj,  
 signifa signaro de l' anim',  
 inicas interno elokvente,  
 ne penas pensado por esprim',  
 la vortoj, birdoj flugantaj libersente.

**Maryam Nezami Janu.1992**



# IRANA ESPERANTISTO

IREA  
Irana Esperanto-Asocio

Kultura sezon-revuo en la persa kaj Esperanto N-ro: 7, Dua serio, Aŭtuno 2013

## Unua Irana Esperanto Kongreso

*“Esperanto, Lingvo de Ideo kaj idealo”*



24-26 Marto 2014, Tehrano



**Novajoj pri  
la Esperanto  
-Movado en  
Irano**

**Ekovilaĝo:  
Savanta  
Solvo?**

**Voitek  
(soldet-  
urso) en  
pola armeo!**